

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Clarence Bicknell

Jen la lasta rozeto de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu rozflor'
Partoprenas kompate en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte formortus mi mem,
Se ne plu min atendus amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola sen amo-respond'?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (*1842-10-27 - †1918-07-17).*

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikisource.org/wiki/AĔĥtoro:Bicknell_C._,_Bordigheza.

Thomas Moore,
La lasta rozo de somero

tradukita de N. N. 101

Nun floras de l'somero la sola lasta rozo.
La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozo:
ne estas flor' parenca, aŭ rozburgono ia,
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti
Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti.
En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dormetas:
Do floron vian teren ĝentile mi disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus:
Ĉar se la koroj veraj kaj dolĉaj ne plu estus,
En la dezerta mondo volonte kiu restus?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.